1-a Jaro, N-o 39

APERAS S.A.T. SEMAJNE

25. Junio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz


Bulgario, la lando de la pendigiloj

Niaj bulgaraj kamaradoj, ĉiutempe tiom skribemaj kaj raportemaj, ĉiam inter la plej viglaj kunlaborantoj al "Sennaciulo", silentas. Raportoj iliaj mankas. Tamen resonas el la ĉiutagaj ĵurnaloj de ĉiuj landoj la eĥoj el la lando de suferoj kaj turmentoj, obtuze, malkomplete, sed tamen divenigante la ekscesegojn grandskalajn, la murdadon kaj buĉadon, kiu semajnon post semajno senĉese kaj senhalte furiozas. Mutigis niajn kamaradojn tiu ekstremo de teroro. Nur de tempo al tempo atingas nin konciza noteto: "Ne sendu gazeton. Sendu nenion. Estas danĝerege!" Aŭ eĉ iafoje kelkaj pliaj linioj, kiel ĉi-suba sciigo sen ~~iaj~~ precizaĵoj. Ĉiam nur la ripetata kanto: Teroro estas nepriskribebla. Mankas do la firma interligo kun tiuj niaj kamaradoj. Rompita estas la komunikado. Ni ne povas skribi al ili, ili ne povas skribi al ni. Gazeton nian ili ne rajtas ricevi.

Restas do sola ago de solidareco por ni: per nia organo sciigi al ĉiuj niaj kamaradoj en tutmondo, kiom granda estas la mizerego de la popolo en Bulgario, kiamaniere la firegistaro procedas por laŭlitere *fizike ekstermi* la proletaron en la lando. *Red.*

IRH. 63 mortkondamnoj en Ŝumen — 5 novaj mortverdiktoj en Sofio — la ekzekutistoj havas "bonajn tagojn" — tiel raportas malvarme la burĝa gazetaro. Por 1000 levoj kaj la ŝnuro kanajlaj ciganoj ĉiutage pendigas la intelektularon kaj la gvidantojn de l' bulgara popolo. Kun plifortigita fervoro la ekstermo de la popolo, kiu jam daŭras du jarojn, estas kontinuata.

La atenco al la katedralo St. Nedelia estas sekvo de la furioza teroro de l' Cankov-registaro, skribas rifuĝinta el Bulgario emigranto. *Ĝenerale oni opinias, ke la atenco povas esti atribuata nek al la komunistoj nek al la kamparanoj* kaj ke ĝi estis verko de individuaj personoj. Sed la atenco estis la dezirita preteksto por la registaro, por efektivigi la jam delonge organizitan planon: masarestadoj, ekstermo de ĉiuj aktivaj inteligentaj elementoj de la komunista partio kaj de l' kamparana ligo. Tuj post la atenco oni komencis arestojn kaj domtraserĉojn laŭ grandskale preparita plano. Sole en Sofio pli ol 2000 personoj estis arestitaj. Kazernoj, lernejoj kaj policejoj estis troplenigitaj de arestitoj. El ili multaj, kvankam ili senkontraŭstare arestigis sin, estis inside mortigitaj. Dumnokte komenciĝis turmentadoj kaj torturoj. Tiamaniere oni provis eltiri konfesojn. Se oni ne sukcesis, oni devigis ilin ekstere de la urbo ŝoveli siajn proprajn tombojn, minacante per mortpafigo. Se konfesoj ne estis elpremeblaj, mortpafigo okazis. La inkviziciajn trupojn estris aŭtonomistoj, macedonoj kaj diversaj nome konataj militist- kaj polic-personoj.



Ekzekuto de k-doj Fridmann, Koeff kaj Zadgorski en Sofio.
Ni honore memoru la mortigitojn de la blanka teroro!

27. majo je la oka horo matene la tri de l' milittribunalo kondamnitaj "atencintoj" *Fridman, Koeff* kaj *Zadgorski* estis pendigitaj. La ekzekuto okazis publike sur libera placo en orienta ekstera kvartalo de Sofio. Minimume 50000 personoj ĉeestis kaj reprezentantoj de ĉiuj eksterlandaj gazetoj kaj ambasadoroj. Precipe k-do Fridman montris kuraĝan sintenon ĝis la fino. Lian lastan deziron, diritan antaŭ la tribunalo: mortpafigi lin per la soldatoj sed ne pendigi lin, oni ne plenumis.

Sciigo el Bulgario

Jam vi scias, ke nia kompatinda lando brulas. Pri nia urbeto mi diras: estas multaj mortigitaj senkulpe. Ekzekutado dumnokta. Pli ol dek kamaradoj jam kuŝas en la tomboj. Vi ne devas paroli aŭ diri la saman veron. En urbo T. esperantistoj estas batitaj ĝismorte. Kruela sort', malbona ŝtat', kiu pereigas sian idaron.

Kamaradaro tutmonda, ne protestu por ni, sed gardu la sanktan memoron pri la ĉi-jaraj bulgaraj kruelaĵoj.

Ĉio estas nepriskribebla. Ni devas silenti kaj laŭdi nian firegistaron. Kio ajn okazu, vivu SAT!

El Portugalio

La venkitaj kapitalistoj estas paradokse la venkantoj

Revolucio de oficiroj en Lisboa. – Fortecrilatoj de demokratoj kaj naciistoj. — La rolo de l' "Komercista Asocio". – La sinteno de l' popolo kaj de la laboristaj partioj. — Armilojn popolo ne ricevas. — La danko de l' savita registaro: persekutoj de proletaro. — Fortransporto en ekzilon de "ruĝuloj".— Laboristaro kaj burĝaro timas!

La 18. aprilo la lisbona urbo estis skuita pro revolucio de iom da teruro, sed pli da kuriozeco . . . Ĉar la lisbona popolo estas ja kutiminta al revolucioj: post la proklamo de l' respubliko, en 1910, oni povas preskaŭ kalkuli unu en ĉiu jaro! Do, pli da kuriozeco ol da teruro. Kiu estas provokanta la *Ordon,* — tiun fantomon, kiun la kapitalistoj metas antaŭ siajn krimajn personojn? Tiu-ĉi-foje, — precize tiuj, kiuj vivas de ĝia subteno: oficiroj! Kial?

Ĉi tie komencas la historio. La progresoj de l' novaj ideoj komencas timigi la kapitalismon. La respublika prezidanto nuna ŝajnas — al ili — inklina al tiuj ideoj. La demokrata partio dividiĝas interne je du sektoj: la dekstruloj, la maldekstruloj, — ĉiuj fine la samaj . . . Ĉi tiu partio estas la plej forta.

Poste, staras la naciistoj, — multe da partioj kunfanditaj, kies eroj neniam ligiĝas . . . La naciistoj akre batalas kontraŭ la demokratoj kaj intencas redoni al malfeliĉa lando la *Ordon,* kiun ĝi forlasis post sperto pri neutilo de obeemo. En Komercista Asocio oni komencas ankaŭ batalon kontraŭ la demokrata registaro. Dume, oni konspiras. Jen la radikaloj malsukcesas, jen oni anoncas oficiran konspiron. Okazas la striko de l' komercistoj (vidu S-ulo no. 10), kaj el ĝi aperas la Unuiĝo de l' Ekonomiaj Profitoj; la komercistoj aĉetas unu el la plej disvastigitaj ĵurnaloj "O Século" (La Jarcento) kaj komencas intensan batalon kontraŭ la registaro kaj kontraŭ la demokrata partio. Du fortoj partiaj alproksimiĝas je la naskiĝanta Unuiĝo: la monarkistoj kaj la naciistoj. La unuaj estas forpelitaj, la duaj akceptitaj. La atakoj de l' "Século" fariĝas pli kaj pli akregaj. Oni preparas la spiritojn . . .

. . . kaj la 18. aprilo, en la kutima loko, kie oni komencas revoluciojn -- kiam la nia? — en la supro de l' Avenuo de l' Libereco aperas kanonoj, soldatoj kaj — politikistoj. Jen faŝista provo. La intenco de l' oficiroj estis nur imiti — la verkaĉon de Primo de Rivera, la ridinda generalo. Malaperigi la bolŝevikan fantomon, liberigi la *honestajn* komercistojn, — ĉio sub la influo de l' Unuiĝo de l' Ekonomiaj Profitoj. La registaro, iom malrapide, sufokis la ribelon. Malgraŭ la kompromiso de l' tutlanda oficiraro iel helpi la ribelon, ĝi mortis iom ridinde, — la estroj forkuris en hispanan ambasadorejon — ĉar mankis al ĝi la plej forta apogo, kiu inter ni sukcesigas la revoluciojn: popola aprobo! La popolo ne aprobis, ĉar oni ne forgesas facile la teruran agadon de l' diktatoro Sidonio Paes, kiu plenigis je laboristoj la kaptitejon, dum cinike li protektis la infanaron.

La popolo ne aprobis, ĉar ĝi estas esence liberema, la historio de popolo estas senlaca lukto por libero! Estas malfacile enkatenigi tian bravan popolon!

La Ĝenerala Konfederacio de l' Laboro, Socialista kaj Komunista Partioj kreis provizoran unuecfronton, — nur ebla antaŭ la danĝero. La sind. organo *A. Batalha* alvokis la popolamason, kiu ĝin amas, al ribelo kontraŭ la ĵus aperintaj faŝistoj. La popolo ekscitiĝis. Oni serĉis vane armilojn. La registaro malpermesis la kutime tiuokazan disdonadon de pafiloj, — ĉar ili, eble, post sufoko de l' revolucio, estus direktitaj al ĝi . . . Per bomboj oni atakis la faŝistojn; heroajn agojn oni rimarkas, la popolo volas kunlabori en la sufoko de l' aĉa ribelo, — dum la demokratanoj, kies kongreso devus okazi tiun saman tagon, forkuris hejmen . . .

Fine, la popolo venkas! La faŝistoj ne sukcesis, ĉi-tiun fojon. Kion faros nun la registaro? — demandas la proletariaro.

* * *

La oficiroj estas komforte instalitaj en militkaptitejoj kaj forkuras laŭvole. La proletariaro — estas persekutata!

Oni elpensis "Ruĝan legionon". Fakto, aro da nomantaj sin kamaradoj agis malnoble. Atakoj al bankoj kaj al klubaj ludejoj, postulo de mono, ŝtelo de monsumoj al kasisto de kompanio, — estis troigitaj de l' burĝaj ĵurnaloj kaj aljuĝitaj al laboristaro. Pri tiaj faktoj estas tro frue paroli. Sed, ilin ankoraŭ ne oni povas kompari al krima agado de l' burĝaro, kiun oni povas indiki per kvar vortoj: milito, senlaboreco, ftizo kaj malklereco!

En militŝipo, sen ia ajn tribunala juĝado, oni enŝipigas la supozitajn "legionanojn", kaj la ŝipo foriras en nekonatan destinon. Batataj estas la laboristoj, krime, sovaĝe, nur pro la krimo, — esti laboristo! La polickomandanto estis atakata kaj trafita, sendanĝere, — la laboristoj, ĉiuj, la sklavaro de ĉiuj tempoj, la kanona nutraĵo, la ekspluatitaj proletarioj, jen la kulpuloj. Oni batas, oni mortigas, oni persekutas. Kie estas la laboristaro, kiu monaton antaŭan ne timis la kanonajn kuglojn? Malaperis, timas . . . La burĝaro timas, la laboristaro timas!

Kiam venkos niaj kamaradoj la timon? Eble nur, kiam ili funde komprenos, ke la sklaveco devas finiĝi, kiam ili scios, kion fari post revolucio. Kropotkin iam diris, ke revoluciulo, kiam li iras en tranĉeon, bezonas armilon kaj ideon. Venu la armiloj, — la popolo estas terure kuraĝa leono!

Sed, ĝi eĉ ne scias legi . . .

José Antunes (832).

SAT-PROPAGANDISTOJ!

NE LACIĜU EN LA VARBADO!

Letero el Aŭstrio

Malpermesita junular-kunveno. – Faŝistoj havas agliberecon. — Ekskursantoj sange disbatitaj. — Heroa laboro de aŭstria policistaro. — Malliberigitoj.

Ankoraŭ ne krustiĝis la tero sur la tombo de fimortigita k-do (socialdem.), flanke de la hokkrucanoj (faŝistoj), — kaj jam estas serĉataj novaj mortigoj.

La komjunularo volis okazigi en Linz renkontiĝon dum la pentekostaj festotagoj, kiel kutime ĉiujare, plie demonstracii kontraŭ la faŝistaj bandoj, kiuj estis okazigontaj demonstracion; sed la landa registaro malpermesis. La komjunuloj, kiuj jam depost du — tri monatoj limigis sian konsumon (eĉ je pano), por per ŝparo kolekti la bezonatan monon, en nombro de kelkaj dekduoj decidis almenaŭ fari ekskurson.

Ho, kia sanga ekskurso ĝi estis!

Sabate vespere, jam en la Wien-a stacidomo estis provokataj la ekskursantoj kaj ties dorsosakoj traserĉataj. Ajna armilo ne estis trovata. Pardonu! Ja estis trovata ruĝa flageto kun soveta simbolo, kaj eĉ ĝi estis forprenita de la policistoj, dum la faŝistoj tute senĝene kaj tre videble portis gumbastonojn kaj aliajn armilojn. Politika egaleco!

Demokratio! Iluziiga vorto!

Dimanĉe, je la 7a matene, Wien-aj gek-doj elvagoniĝis jam en antaŭurbo *Kleinmünchen,* por de tie envice marŝi al Linz. El la fenestroj ili estis salutataj per krioj "Vivu la junaj ruĝuloj!" "Mortu la reakciuloj!"

Alveninte en *Kaplanhof,* Linz-a k-do salutis la venintojn kaj tuj post respondo de Wien-a k-do re-formiĝis la vicoj, kiuj ekmarŝis urben.

Spontane, proksimume 200 policistoj haltigis la marŝantojn — per celpretaj revolveroj kaj ordonis disigon aŭ . . .! La ordono estis plenumita, ĉar ili rimarkis tiujn mienojn dirantajn la jam hieraŭ aŭditajn vortojn: "Vi malbonaj hundoj, la ekskurso al Linz estos bone salita al vi, ke vi memoru pri ĝi longtempe". Ĉefparto reiris Kaplanhof-on kaj kelkiuj dise iris urben por vidi ion.

La faŝistoj ktp. armitaj per gumbastonoj kun nigraflavaj flagoj netuŝite marŝis. De ĉiuj flankoj krioj kontraŭ la reakciuloj. Bone, la krioj venadis el inter la scivolema amaso kaj ne multe da komjunuloj ĉeestis, preskaŭ ĉiuj estis en Kaplanhof, sed la sangaviduloj, policistaro, kriminaloficistoj kaj faŝistoj, atakis la komjunulojn. Dum ĉi atako ili arestis 30—35 gek-dojn, kelkajn vundis, kaj pri gumbatitoj mi ne parolu.

La dua atako verigis: "La aŭstria policistaro estas la plej bona en la mondo", nome, laŭ metio.

La Linz-a policistaro kun la faŝistoj sieĝis la Kaplanhof-on. Tuj la komjunuloj faris homĉenaron opiniante tiel eviti pluajn malagrablaĵojn, sed tiel daŭris, ĝis alveturis plifortiĝo el Wien per du ŝarĝaŭtoj kaj ordonante la disigon jam la elingitaj

sabroj penetris la korpojn de la gekamaradoj.

El 220 arestitoj proksimume 45—50 estis nekontuzitaj, eĉ kelkaj estis grave vunditaj! La k-dinoj havis la saman sorton. 9 k.doj estas transdonitaj al landa juĝejo. En mallibêrejo ankoraŭ troviĝas multaj k.doj, inter tiuj ankaŭ SAT-anoj.

Rimarkinde estas, ke tuj post la pruvomontro de ilia partilegitimaĵo la arestitaj faŝistoj estis liberigitaj.

La lasttagaj faktoj dokumentis, ke la "Demokrateca Ŝtato" Aŭstrio eĉ superis Musolinion."

Poro.

El sovetlanda urbeto

(Fino).

Profesia vivo. – La organiziteco en prof. unuiĝoj. – La spezoj de l' prof. unuiĝoj. – Asekuro. – Senlaboreco. — Labortempo. – Salajro. – La neegaleco de la salajroj kaj klopodoj forigi ĝin. – Regna helpo en malfortaj regionoj. – Tendenco de l' prezoj. – Kooperacio. — Kunlaboro inter potenco kaj masoj.

Mi ne tial komencis per la priskribo de l' kultura vivo, ke mi mem estas instruisto, sed ĉar en tiu sfero la plej rimarkebla estas la progreso, la movado en vivo de N.-V. Sed ankaŭ aliaj flankoj montras ion interesan.

Ni transiru, ekzemple, al la profesia vivo. En nia eta domaro, kiu antaŭ la revolucio apenaŭ aŭdis pri iaj proforganizaĵoj, krom la unuiĝo de komizoj, ekzistas nun 16 profunuiĝoj. Nature, ili ĉiuj estas nur fakoj (rajĉeloj) de koncernaj tutuniaj organizaĵoj. La tutaj organizaĵoj estas unuigitaj per la "Profsekretariejo", kun la reprezentanto de Gub. Kons. de Prof. Unuiĝoj, kiel estro. Profsekr-ejo havas sian sidejon en la "Domo de unuiĝoj", kie lokiĝas ankaŭ kanceloj de plejparto de l' unuiĝoj. La plej multnombraj estas ĉe ni jenaj profligoj:

laboristoj de l' grundo kaj arbaro — unuigas la batrakojn (landmastrumajn dungatojn), agronomojn, grundmezuristojn, arbaristojn ktp. — 304 anoj;

sov.-laboristoj — unuigas funkciantojn de l' rajona kaj vilaĝaj sovetoj, komitatoj de malriĉaj vilaĝanoj ktp. — 258 anoj;

laboristoj de klerigado — instruistoj kaj tuta personaro de lernejoj, inkluzive gardisto — 188;

konstruistoj — 130 anoj; fervojistoj 101 anoj ktp.

Entute ekzistas en la urbeto 1631 profanoj, sed 1827 dungitoj, do 196 personoj ne estas entiritaj en proforganizaĵojn. Elglitas el sfero de unuiĝa influo plejparte la batrakoj en kamparo, kiuj, estante ofte en granda dependeco de ilia mastro "dikventrulo", sin deklinas de l' registriĝo, kiel dungitoj, kaj tiamaniere maltrafas la Unuiĝon. Ĉar vi ne kredu, ke l' klasbatalo ĉe ni estas jam finita — tre longa vojo restas ankoraŭ ĝis tia fino, kaj la diktaturo mem estas ja la periodo de l' plej streĉa, de l' plej obstina batalo. Ni nur havas povon ĝin certe kaj libere konduki!

Niaj profunuiĝoj ne estas riĉaj ĉi-loke, ĉar la plejparto de kolektata mono (3 % por la kotizo) iras por pli superaj instancoj. Tamen "Lab-Vilaĝana Ejo" estas preskaŭ tute subtenita per la mono de profunuiĝoj. Specialaj depagoj (1 %) iras ankoraŭ en la profesiajn "Kasojn de Interhelpo", kiuj iamezure subtenas prof'anaron en malfacilaj cirkonstancoj per siaj dume neabundaj, sed iom-post-iom kreskantaj monprovizoj (la kaso de mia unuiĝo havas, ekzemple, 760 rublojn, kiuj ĉiam estas en spezo; la pruntedono ŝanceliĝas inter 15—25 rubl., kun repago po 5 rubl. po monato). Por la okazoj, speciale antaŭviditaj per la leĝaro (ekz., akuŝo de la laboristedzino, malsano aŭ morto de laboristo aŭ liaj familianoj, kaj aliaj) la laboristo ricevas helpon jam ne de prof. organizaĵo, sed el regna "kaso de l' sociala Asekuro" ("Asekkaso"), kiu ĉe ni laboras senrifuze. Kapitalo de tiu kaso kunmetiĝas el specialaj forpagoj, farataj per privataj kaj regnaj dungantoj -- egale — samtempe kun salajrpagado ĉiumonate, en sumo 10—16 % de salajro. Takso de premioj: por la infano — 14 rubl., tiom same por la enterigo. Ĉiu dungito, ĉu li estas profunuiĝano aŭ ne, rajtas asekuriĝi. Nun ĝuste estas ellaborata la leĝo pri ia malgrandigo de asekurforpagoj kaj, sekve, de premioj — dumtempe, por plifaciligi nian industrion.

Ankoraŭ ne forigita kaj parte (laŭloke) eĉ pliakriĝanta sociala malbono de nia vivo estas senlaboreco, intime kunligata kun la nesufiĉa ankoraŭ disvolvo de nia produktado. Ni havas por l. l. 282 senlaborulojn nur el profesianoj. Parte ili organizas kolektivajn laborejojn (ekzistas nun: razejo, kudrejo, 2 botistejoj), parte (tutaj ceteraj) ricevas ĉiumonatan malgrandan subtenon el la "Asekurkaso" (laŭ la kategorio — 7,25 kaj 4,75 rubl.).

La labortago ĉe ni estas okhora ĝenerale, sed por iaj laborspecoj estas plimalaltigita (ekz. por kancelistoj — 6 ½ horoj. Por neplenkreskuloj de 14 ĝis 16 jaroj — seshora.) Malekze kuto detiu kardinala almilitaĵo de l' revolucio, sendube, havas ankoraŭ lokon, sed ĝi neniel estas legitimigita. Ĉiuokaze, proforganizaĵoj kaj la Inspekto de l' Laboro observas atente, ke tiaj trouzoj forestu.

Salajro ĝis nuna tempo prezentas sufiĉe diverskoloran bildon, ĉar 1. ĉiu profunuiĝo havas la tutan serion de kategorioj [1]) pagataj (ekzemple, en nia lernejo instruisto apartenas al XIII. kategorio, ĉambropurigisto al la VI.; 2. proporcio de l' salajro de la malsupera kategorio al la supera, tiel nomita "reto", estas neegala por diversaj unuiĝoj; ekz. en la unuj "reto" estas 1 : 5, t. e. la supera kategorio havas kvinoblan salajron kontraŭ la malsupera, en aliaj — 1 : 8; 3. la pripagataj "unuoj" havas diversan valoron ne sole por diversaj unuiĝoj, sed ankaŭ en kadroj de l' sama unuiĝo, dependante de l' grandeco de entrepreno, ĝia signifo en regna laboro ktp. (ekzemple, la instruistoj de subaj lernejoj de sama kategorio ricevas pli etan salajron, ol la instruistoj de l' superaj; ankoraŭ "unuo" por nia ŝtalfandejo egalas 10 rbl. 50 kop., sed por elektrostacio (la sama unuiĝo) — jam 13 rbl. 11 kop.). Tia komplikita sistemo elvokis multajn plendojn pro sia "maljusteco" inter nekonscia parto de laboristaro kaj, precipe, de oficistaro (interalie, tre malkontentaj estis ĉiam la instruistoj, kies salajro estis vere mizera; nun vilaĝa instruisto ricevas 25 rbl.). Sed ĝi estis natura sekvo de laŭnecese alprenita per gvidantaro principo de l' "frapeco". Tuta manovrarto de l' partio kaj Sovpotenco (sekve ankaŭ de profunuiĝoj) en la tarifproblemo estis ĝuste en la regula difino por ĉiu momento de l' plej malforta, plej dolora, plej batebla spaco de nia ekonomia fronto, por nome tien direkti la ĉefajn streĉojn, la ĉefajn helpojn, la ĉefajn "frapegojn". Koncerna industriregiono estis proklamata "subfrapeca", okupitaj en ĝi laboristoj kaj funkciantoj ricevis pli grandan salajron, kaj ĝenerale ilin iom pli oni dorlotis, ol la ceterajn. Poste de ili oni transiradis al la aliaj, kaj tia fleksa manovrado avertis la katastrofojn, tiel proksimajn tie kaj tie post jaroj de imperialisma kaj civila militoj. Nun, paralele kun laŭgrada interegaligo de diversaj industriregionoj estas pliglatigataj ankaŭ la diferencoj en salajro (kampanio de unuformigo de salajro, kiu estas preskaŭ jam finita en Sov-Rusio, sed tie ĉi, en Ukrainio, nur estas antaŭpreparata.) Komprenebie, ke l' tuta salajregaleco (t. e. neniigo de l' kategorioj) ne estas ebla en kondiĉoj de NEP (t. n. "nova ekonomipolitiko"): ĉar ni tre bezonas specialistojn, ni devas ilin tre bone pripagi, por ke ili ne lasu nin kaj ne forkuru eksterlanden; sed doni al ĉiuj tiom, kiom al "spec-oj" (spec-istoj) la regno ankoraŭ ne povas, la nekvalifikitaj laboristoj devas esti kontentaj kun multe pli modesta salajro — de tie eliras la neegaleco. La tuto estas finfine kunligita kun la stato de nia socialisma (regna) industrio: kun ĝia kresko kreskas ankaŭ la bonfarto de masoj. La tasko estas tiom pli malfacila, ke 1. ni havas neniajn modelojn por imitado, ĉar la provo de l' plana mastrumo estas nur la unua en historio, 2. nia produktado estis malmulte (eĉ ete) disvolvita antaŭ la milito, kaj 3. ni ĉiam ankoraŭ estas preskaŭ izolitaj ekonomie (senkredite). . . .

La tendenco de prezoj estas — plimalkariĝo por industriproduktoj, plikariĝo por produktoj de landa mastrumo, la lasta, interalie, en kunligo kun ne tute sufiĉa grenrikolto de l' pasinta jaro.

Kelkajn vortojn pri nia kooperacio. Ĝi naskiĝis en nia urbo dum milittempo, sed havis tiam pure spekulacian karakteron, kaj ĉiuj 6 magazenoj de diversaj "koop. kuniĝoj" krevis aŭ estis fermitaj. Nun ni havas Unuecan Laborist-Urban Konsuman Societon kun dume 700 membroj (do estas enkooperaciita malpli ol 7 ½ % da loĝantaro), kies kotizo estas difinita je 5 rubl., kun spezo (por februaro) ĝis

---

1) Difinante la kategorion, oni atentas a) specialecon, b) antaŭpreparon, c) laborstaĝon.

30000 rubloj, kun 3 grandaj kaj ĉiam kreskantaj universalaj magazenoj ("univermagoj"), manĝejo, bakejo, libro- kaj skribilarvendejo, viandvendejo kaj ĉiam kreskanta reto de "budoj". Estas organizita vilaĝa "distribuejo" por la pli intima interligo de l' urbo kun la kamparo (signalo de tuta nia politiko). Krom tio ekzistas magazenoj kaj deponejoj de diversaj kooperativaj *unuiĝoj*. La reto de kooperativoj kreskas ankaŭ en la rajono (ekzistas 40 vilaĝaj kooperativoj kun 2500 membroj kaj suma spezo dum februaro 40000 r.). En printempo de 1924 eknaskiĝis en nia rajono la landmastruma kooperacio, kiu en 5 kooperativoj unuigas nun ĉ. 800 membrojn.

Ankoraŭ unu — la lasta trajto, ĉi-foje el nia administra vivo. Antaŭ nelonge okazis la unua larĝa ekonomia interkonsiliĝo: la tuta REK kun ĝiaj "specoj" kunvokis la aktivistaron de proforganizaĵoj, kaj estis priparolata la tuta mastruma vivo de l' urbo, aŭskultitaj kaj sciakceptitaj proklamoj kaj plendoj pri tiaj kaj aliaj neperfektaĵoj. Tia kuna laboro de l' potenco kun la masoj estas garantio kaj sekreto de niaj — parte preskaŭ nekredeblaj — sukcesoj. La laboristoj de l' maŝino kaj vilaĝanoj de l' plugilo estas tie kaj tie rekomenditaj per la subaj organizaĵoj por administraj oficoj en guberniajn kaj centrajn organojn.

G. Filipov.

Religiaj parazitoj en Polio.

"Walka ludu" (Batalo de popolo) statistikis nombron de la parazitoj vivantaj de la religio:

En buĝeto de ministrejo por religiaj konfesioj kaj publika klerigado (?!? Trad.) ni trovas flanke de sumoj elspezataj de la ŝtato por subtenado de pastroj de diversaj konfesioj ankaŭ ilian nombron.

Katolika konfesio "okupas" en Polio entute 13371 personojn. El ili estas 6564 prepostoj, 529 monaĥoj, 2576 pastroj seminaranoj, 44 episkopoj kaj ĉefepiskopoj. Ili ricevas en k. j. de la ŝtato pli ol 14500000 zlot. Ĉi-sumo estas ankoraŭ bagatelo kompare kun tio, kion ili mem delogas el la popolo pro diversaj praktikoj "por savo de la animo".

Popoj ortodoksaj (grek-kat.) estas 1061 personoj, kaj ili ricevas 955000 zlot.

Evangelianaj pastroj kaj oficistoj de kvar diversaj konfesioj estas 556. Ili ricevas 466000 zlot.

Mahometanaj imamoj-muezinoj estas 32. Ili ricevas proksimume 48000 zlot.

Rabenoj ricevas subtenon de 10000 zlot. Bedaŭrinde ilia nombro ne estas indikita. Certe da ili estas belaj kelkmiloj grasiĝantaj je kosto de siaj "kreduloj". Por aliaj etaj konfesioj la ŝtato difinis 2000 zlot.

Kune ĉiuj konfesioj ricevas pli ol 16 milionojn da zlot, kiuj estas dividataj inter pli ol 15 mil diversaj pastroj krom rabenoj. Ne malbona tributo pagata el impostoj. Sed kiom krom tio? El ĉi-sumo ja ĉiu malpli ol cent zlotojn ricevas (pomonate), sed aliflanke ĉi-samon aŭ eĉ pli niaj "animpaŝtistoj" prenas por unu edziĝa aŭ enteriga beno. Ili estas malriĉuloj — ŝtatan subtenadon ili bezonas.

Ĉi-elspezoj estas necesegaj. Sed ili fermis 4000 popollernejojn, por malpligrandigi la ŝtatajn elspezojn. *Kortegano.*

D I S K U T E J O

Unuecforma aŭ unuecspirita movado?

La problemo tuŝita de K-doj 2921 kaj V. Kolĉinski estas tre grava, ĉar ĝi koncernas pluan disvolviĝon de laborista Esp-o-movado kaj ĉar ĝi celas plian kreskon kaj fortiĝon de SAT. Ni ne devas konsideri la problemon kiel nure organiza — ĝi ampleksas la tutan movadon en ĝia plentuteco de la formoj kaj de la celoj. Solvante la problemon, ni samtempe antaŭdifinas per tio direkton de nia movado kaj de nia laboro. Ĉio ĉi necesigas grandan atenton niaflanke kaj plej detalan analizon de la nuna movado-stato.

Kie embrias la propono pri unuecforma organizo?

Dum lastaj jaroj SAT-ideo kaj ekzisto de SAT evidentiĝis plene celtrafaj. La ekzisto de SAT kaj ĝia fruktodona laboro ne nur vigligis proletan Esp-o-movadon, sed alportis al Esp-o grandajn sukcesojn ĉe klasbatalaj laboristaj organizaĵoj. Estante organizaĵo per-esp-a, batalante kontraŭ la tendencoj fari ĝin samtempe poresp-a organizaĵo, SAT spite tio per sia ekzisto varbis por Esp-o pli sukcese, ol la landaj aŭ lingvregionaj laborist-esp-istaj organizaĵoj, ofte pli aĝaj ol SAT. Tiu fakto estas tiom okulfrape evidenta, ke ĝi naskas la problemon metitan de K-do Kolĉinski kaj 2921: kial do ekzistu purepropagandaj organizaĵoj? Pli bone ni koncentrigu niajn fortojn en SAT kaj la lasta, jam montrinta sian vivkapablon, estu la sola kaj unueca formo de la movado!

Ni analizu la sukcesojn!

Sed ne sufiĉas konstati la fakton, necesas analizi ĝin por fari la konkludojn. Kial SAT alportis sukcesojn por Esp-o? Ĉar ĝi per siaj per-esp-aj labormetodoj el la artefarita lingvo internacia kreis vivan kaj per sia viveco konkretan ligilon de tutmonda proletaro, ilon de ĝia klasbatalo. Propagandaj organizaĵoj penis per vortoj kaj paroloj varbi por la ideo, la peresp-a *SAT allogis per siaj rezultoplenaj agoj al la ideo konkretigita.*

Diversaj konkludoj.

Tiu sukceso de la peresp-a metodo tuj sekvigis intencojn de la propagandaj organizaĵoj ŝanĝi siajn rolojn kaj en la skalo landa aŭ lingvregiona apliki la samajn metodojn, kiujn SAT aplikas en la skalo tutmonda. Anstataŭ helpi al SAT kaj utiligi propagandacele tiujn fruktojn kiujn ĝi alportas, ili ekprovis plenumi laboron paralelan al SAT, tiamaniere konkurante al SAT kaj subfosante la radikojn de la arbo, kiu evidentiĝis tiom fruktodona. Sed la aŭtoritato de SAT estis jam tiom granda, ke kiam Cassel-Kongreso malaprobis tiun tendencon, kiel danĝeran por la tuta movado, — la averta decido de la Kongreso estis obeita de la propagandaj organizaĵoj.

K-doj Kolĉinski kaj 2921 nun faras el la sukcesoj de SAT-metodo konkludon tute malan al tiu, kiun estis farintaj la poresp-aj organizaĵoj. K-doj Kolĉinski kaj 2921 konsideras necesa, ke SAT krom sia aparato de lingvo-aplikado kreu aparaton por utiligo porlingva de la fruktoj kiujn donas la lingvo-aplikado. Ne ekzistas kaj ne povas ekzisti duboj ke ilia konkludo estas sincere bonintenca. Sed same sincere ni provu analizi:

Ĉu estas ĝusta ĉi konkludo?

Ke la lingvo tutmonda povas esti aplikata trafe, se la aparato por la aplikado estas tutmonde koncentrigita — estas ekster ĉiuj duboj. Pri tio, ke porpropaganda utiligo de ties rezultoj ne povas esti same koncentrigita, K-doj Kolĉinski kaj 2921 mem ne dubas: paralele al la sennaciece konstruitaj SAT-fakoj (ekz. literaturista), ili proponas propagandajn fakojn sur principo de nacilingvaj regionoj. Projektitaj kiel aŭtonomaj, elektantaj siajn nacilingveregionajn administrarojn, ili fakte estus ne propagando-*fakoj* de SAT, sed *propagando-asocioj* el membroj de SAT. Kiel tiaj, ili *devos alpreni jurajn formojn,* dependajn de la enlanda leĝaro kaj konformajn al ĝi. Praktike K-doj 2921 kaj Kolĉinski opinias tion atingi per memvola jura likvidiĝo de la ekzistantaj propagandaj organizaĵoj kaj per ilia fakta transformiĝo en la novajn — kun la samaj kotizaĵoj kaj kun la samaj celoj kiel la antaŭaj. Sekve la unuecformo de la organizo estos nur ŝajna. Tamen povus embrii en ĝi

praktikaj rezultoj,

nome aŭtomata kresko de SAT-membraro (ĉar ĉiu proleta esp-isto fariĝus laŭ la projekto membro de SAT) kaj samfoja propagando por Esp-o kaj por sennaciismo. Se nun ĝenerala sumo el membrokvantoj de l' propagandaj organizaĵoj pli nombras ol SAT-membraro, rezulte de la reformo kreskos aŭtomate la nombro de SAT-*membroj,* sed ĉu pro tio la SAT-*anaro* kreskos same aŭtomate? Kaj ĉu nun SAT-ano preferas propagandi la ideon pri internacia lingvo kaj ĝian solvon, silentante pri la konkreta enkarniĝo de la ideo mem kaj ĝia solvo en SAT? Ne por respondi al la demandoj mi metis ilin, sed por alvoki nian SAT-anaron pripensi ilin profunde. La potenco de l' kolektiva penso montros, kiel tiuj konkretaj rezultoj estas konkrete atingeblaj.

En teoria serĉado ni restu sur la bazo reala

kaj pripensu, kiamaniere nun, kiam akras atako kontraŭ la laboristaro, kiam kapitalistoj penas per karceraj muroj tranĉi la vojon al ideoj de proletaro, kiam en kelkaj landoj niaj kunbatalantoj por SAT-

ideo estas devigataj agi kaŝite kaj nelegale, kiam la sama stato minacas en aliaj landoj, kiam efektivigado de "demokratiaj" principoj malkaŝe transiras en la manojn de Hindenburg kaj de tiuj, kies mano li mem estas, — kiamaniere ni organizu la movadon, por ke reakcia bato ne detruu ĝin. Ĉu en tiuj kondiĉoj preferinda estas unn organizformo, bato kontraŭ kiu estos samtempe bato kontraŭ la tuta movado, aŭ kelkaj organizformoj por ke bato kontraŭ iu el ili provizore detruas nur ĝin, sed ne la tutan movadon. Ni pripensu kaj serĉu pleje rezisteblajn por la realaj kondiĉoj organizoformojn, *zorgante ke en tiuj organizoformoj regu nia unueca spirito,* ke malgraŭ diversformeco organiza

nia movado estu unuecspirita.

El sukcesoj de SAT ni faru ĝustajn konkludojn kaj estu vere aktivaj SAT-anoj, laborante en ĉiuj branĉoj de la proleta esp-movado, akcelante plinombriĝon de la fruktoj, kiujn alportas SAT-ekzisto kaj utiligante tiujn fruktojn. Mi estas konvinkita ke ni ne jam elĉerpis ĉiujn eblojn, kiujn prezentas al ni SAT, ke ni nur apenaŭ malvolvis la eduklaboron, kiu kuŝas baze de la SAT-celaro kaj tial ni devas pensi ne pri la aŭtomata algluo de SAT-matrikulo sur ĉiun proletan esp-iston, sed pri tio ke la utilo de SAT por proleto ĉiam kresku, kaj nome tiu konkreta, reala utilo logu proletajn esp-istojn en SAT. Ni konfesu, ke ni ne jam ĉion faris por tio.

Mi sentas min kvazaŭ iom malprogresinta, kontraŭbatalante la ideojn de aktivaj SAT-kamaradoj, kies proponoj estas diktataj de ilia bonintenco por SAT; kaj malgraŭ tiu sento, dum balotado mi hezitus levi mian manon por la proponoj de k-doj Kolĉinski kaj 2921: ŝajnas al mi, ke laŭesence mi pli bone subtenos ilian bonintencon, se mi preferos ankoraŭ pli vigle labori en kaj por SAT, ĉar laŭ mia konvinko kresko kaj disvolviĝo de SAT kaj de ĝia laboro pli ol io proksimigos tiun momenton, kiam ne poresperantaj organizaĵoj de proletaro propagandos Espon, sed la ĝeneralaj klasbatalaj laboristaj organizaĵoj tion aktive estos plenumantaj (ĉu ni ne vidas antaŭsignon por tio en la lasta decido de Internacia Transportista Federacio, kiu pro sukcesa apliko de Esp-o venis al neceso ne nur propagandi ĝin per sia presorgano, sed utiligi ĝiajn paĝojn por instruado de Esp-o). Kaj *tiam vere ne necesos la nunaj propagandaj organizaĵoj,* dum la SAT-laboro restos nepre necesa multajn jardekojn. *G. Demidjuk.*

Baloto pri nova Direkta Komitato

Tro malfrue, t. e. post la presado de la voĉdonilo kaj dissendado al anoj de sektoroj 11—33, ni ricevis la kandidat-deklarojn de:

K-doj *Sinso Ĉen,* Peking, *J. S. Marquez,* S. Paŭlo; *Soudant,* Biache-St. Vaast; *H. Stay,* Bournemouth; *W. Clarke,* Sydney; k-dino *Lustinetz,* Wilsdorf-Bodenbach; k-doj *Köckeritz, P.,* Dresden; *Lehmann, Reinh.,* Dresden.

Pro la granda prokrasto iliaj kandidatecoj do ne jam validas por tiu ĉi baloto. Ili konsoliĝu je la venonta fojo . . .

Lingvaj studoj

(Ĝeneraligo de sufiksoj *-io*, *-oz* kaj *-es*)

Unu el la plej urĝaj kaj solvendaj demandoj estas tiu pri uzado de vortoj, kiuj finiĝas per *io.* Granda konfuzo regas en ĉi demando. Kaj dume nia lingvo estas invadata de senĉesa torento da novaj bezonaj kaj senbezonaj, spritaj kaj malspritaj vortoj similaj al la jenaj: administracio, telefonio, dislokacio, centralizacio, delegacio, Esperantio ktp. Esperanto estas minacata droni en ĉi sovaĝa torento, perdi siajn simplecon kaj regulecon. Kiel rilatas al ĉi demando Lingva Komitato? Th. Cart (membro de L. K. kaj de la Akademio) en la libro "Du mil novaj vortoj"" oficiale diras: "La Akademio povas nur akcepti tion, kion la vivo, la praktiko montris akceptinda, bona, vivkapabla". Krome li scienciste ĝojas pri abundo da novaj vortoj, kiu laŭ lia certigo estas absolute ne danĝero, sed kontraŭe riĉeco. Tamen evidentas, ke ĉi abundo kaj konfuzo balastigas nian vortaron kaj proksimigas ĝin al neraciaj, ĥaosaj vortaroj de nacilingvoj. *Sciencistoj, kiel vi vidas, volas ludi nur rolon de faktokonstatistoj. Ili* fingron ne movos por ion krei en nia lingvo eĉ se ili estas kapablaj por ĝi. Satanoj, notu ĝin bone, lasu viajn esperojn pri sciencistoj kaj mem gardu vian aferon. Sciencistoj venos poste nur por konstati kaj certigi vian laboron.

Koro doloras, kiam mi pensas pri dirita torento da novaj vortoj, kiuj malsprite balastigas nian vortaron kaj igas ĝin simila al niaj naciaj vortaroj.

Ĉu ekzistas rimedo por ordigi kaj sendanĝerigi la torenton?

Jes, la problemo estas solvebla sufiĉe facile, se oni kuraĝe rigardos la aferon de pli malproksima kaj ĝeneraliga punkto, kiu larĝigas videjon.

Nia Lingva Komitato same povus ĝin solvi, se ĝi ne estus nur simpla kaj sensprita registrilo de novaj vortoj, hazarde uzitaj de niaj vicanoj.

Jen estas tri ĉefaj principoj, kiuj devas gvidi nin en la problemo:

1) Sufiksoj en nia lingvo estas multe pli potencaj, ol simplaj radikvortoj. Tial atentu ilin antaŭ ĉio kaj ĝeneraligu ilian uzadon.

2) Nia vortaro devas esti kiel eble plej mallonga ĉar ĝi faciligas lernadon kaj uzadon de lingvo. Tial novaj radikoj devas esti kiel eble plej malmultaj. Por ricevi ĉion necesan ni devas serĉi kaj elĉerpi internajn rimedojn de lingvo.

3) La vortoj devas esti mallongaj ĉar tio faciligas ilian kombinadon kaj uzadon.

Unuvorte en tuta nia laboro nin devas gvidi Eternulo, kiu nun estas nomata Ekonomio. Nia lingvo estas racia kaj tial ĝia evoluo devas esti same racia kaj ne sekvi blindan vojon de simpla tradicio kaj uzado, sur kiun volas nin konduki nia sciencoza Lingva Komitato gvidata de fremda dio.

Do helpataj de dio nia ni montru kiele oni povas solvi la problemon kaj senbalastigi nian vortaron de *centoj da novaj vortoj, kiuj ŝarĝas nin nur dank' al malspriteco de niaj instruitaj vortaristoj.*

Esplorante ĉiujn vortojn kun la finaĵo — *io* ni facile konstatas, ke ĉi finaĵo ludas la du rolojn — la rolon de certa kaj natura sufikso kaj en aliaj tute difinitaj okazoj tiun de simpla kaj preskaŭ sensignifa radikvosto aŭ kvazaŭsufikso. En la vortoj *geometrio, magio, astronomio, Sovetio, Anglio, ĥirurgio* ĝi havas tute klaran signifon de scienco, okupo aŭ lando posedataj de. Kaj en la vortoj *kolonio, gracio, nacio, kopio* ĝi havas ne malpli klaran sencon de simpla kaj okaza radikvosto havanta neniun signifon aŭ sencon (se malatenti la por ni ne interesan naturlingvan vortoriginon). Esplorante pluen ni facile rimarkas, ke la finaĵo — *io* havas funkcion de sufikso nur kiam ĝi estas metata al vortoj montrantaj iston, ilon aŭ loĝanton (malofte agon), kiuj per ĉi sufikso donis nomojn al siaj landoj, okupoj aŭ sciencoj. *Astrologio, magio, ĥirurgio, Burjatio, telefonio, mikroskopio, fotografio, ekonomio* estas sciencoj, artoj, okupoj, landoj posedataj aŭ kaŭzataj respektive de astrologoj, magoj, ĥirurgoj, burjatoj, telefonoj, mikroskopoj, fotografoj(istoj), ekonomoj. *La finaĵo — io estas evidente vera sufikso* nur *kiam ĝi montras landon, okupon aŭ sciencon posedatan aŭ kaŭzatan de.*

Jen ni trovis la formulon, kiu ne havas escepton, ĝeneraligas la uzon de ĉi sufikso kaj bone povas gvidi nin (kaj precipe lingvokomitatanojn) kiam oni *acias* aŭ *ioas* uzante novajn nefundamentajn vortojn. Ekzemple, kiam ni ŝancelstaras inter du formoj *evolucio, analogio, konfidencio* kaj *evoluo, analogo* kaj *konfidenco* ni jam facile, senhezite kaj senvoĉdone devas preferi la *duajn* pli mallongajn vortojn ĉar tie ĉi — *io* estas sensenca radikvosto sendolore forigenda . . . La leganto mem facile vidas, kian ŝparon ricevos post oficialigo de la formulo nia postzamenhofa vortaro sensprite ŝarĝata de *multcentoj* da radikoj, kiuj fakte estas nur derivaĵoj (*astronomio, filantropio, biologio, diplomatio* ktp.). Plue — la formulo ebligas unuigi, korekti kaj reguligi derivadon de vortoj similaj al la jenaj — *administrio, ministrio, direktio, redaktio, arĥitektio* anstataŭ la regulrompantaj *administracio, direkcio, ministerio, redakcio, arĥitekturo.* Nia dio estas Ekonomio. Dio devas esti amata pli forte ol io alio, eĉ ol Fundamento. Ne timu la peketon pri la momenta indiferento al Fundamento ĉar efektive mia propono ne rompas, sed firmigas ĝin. Satanoj, gardu la principon: *kiel eble plej malmulte da novaj vortoj!* Via intereso postulas ĝin ĉar vi ne posedas senokupan tempon kiel sciencistoj por parkeri dikajn vortarojn . . .

La saman (nur iom malpli larĝan) rolon ludas alia postzamenhofa sufikso *oz.* La zamenhofa radikaro ne havis ĝin kaj tial la sufikso eniris kelkajn zamenhofajn vortojn kiel sensignifa radikvosto, ekz. la vortojn *furioza,* kaj *grandioza.* Dum la unua post oficialigo de *oz* montriĝis tute laŭregula (radiko *furi'*) la dua rompis la regulon per nacia interlitero *i (grand-i-oza).* Evidente post oficialigo de sufikso *oz* ni devas ŝanĝi la regulrompantan *grandioza* en regulan, logikan kaj simplan *grandoza* por tiel senbalastigi nian radikaron ankoraŭ je unu superflua radiko. La sufikso — *es,* pri kiu mi parolis en mia antaŭa artikolo, povas montri nur posedon. La vortoj *kies, ies, nenies, ĉies, alies* signifas respektive de kiu, de iu, de neniu, de ĉiu, de alia sed ili tute ne signifas la vortojn: *kia, ia, nenia, ĉia, alia.* Tial la sufikso povas anstataŭi nur genitivon de aparteno kaj nur kiam la lasta ne povas esti anstataŭita de adjektivo. *Patra domo* montras ne sole apartenon, sed ankaŭ nuancon de eco. *Patres domo* montras, ke la domo apartenas al patro, ĝi povas ne esti hejmo de patro kaj la patro povas eĉ neniam vidi ĝin. Uzu la sufikson nur en okazoj de precizigo. Ni havas la rajton ĝeneraligi ĝian uzadon des pli, ke ĝin faris Zamenhof mem. La vorto *ĉies* estas donita post kiam Zamenhof skribis Universalan vortaron. La sufikso estas ŝpariga (*kies* estas pli mallonga ol *de kiu*). Tial ĝia

uzado estas en favoro de Dio de socia vivo nomata Ekonomio kaj ĉie reganta nun kaj eterne. Amen. *Maksim Krjukov.*

TRA LA KLASBATALO

La ĉinaj ribeloj serioze minacas la britan imperialismon en Oriento. La ribeloj ankaŭ transportiĝas al la nederlandaj kaj britaj kolonioj en Oceanio. La movado plilarĝiĝis tra tuta Ĉinio. Bataladoj en Kanton kaj Hankaŭ.

Painlevé decidis daŭrigi la militadon en Maroko. La rifkabiloj progresas en sia ofensivo.

La germana registaro planas "ŝajn"-amnestion, por trankviligi la laboristaron, kiu nur trafos tre limigitan parton de la politik-arestitoj.

En la balotoj al ĝenerala konsilantaro de l' Seine-departemento (Francio) la maldekstraj partioj sukcesis venke.

La metallaborista unio de Charleroi decidis la ĝeneralan strikon.

KRONIKO

Nederlando.

E. La 10-a kongreso de Nederl. Fed de Lab. Esp. okazis 1. 6. en Hilversum (vidu antaŭa n-o). Ĝi ne atestis pri prospero kaj progreso de la lab. esp. movado en Nederlando. — Estis starigata komisiono por, se eble, aranĝi skriban esp. kurson. Rezolucio rekomendanta al la membroj abonon je *S-ulo,* estis malakceptata. Proponon pri starigo de Intern. Lab. Esp. Asocio oni akceptis. Opozicio de SAT-anoj ne efikis. Kiel sekr.-kasiston oni reelektis k-don A. Kloek, I-ste Sweelinckstr. 19, II a, *Amsterdam.* Gvidon de Ned. Lab. Esp. Servo transprenis provizore k-do Woud, Wormerveer. — SAT-anoj disdonis specialan n-on de "SAT-propagandisto" kaj vendis SAT-eldonaĵojn.

Internacia Fervojista Kongreso en Bellinzona

Jam nun oni povas konstati, ke la vizito al la fervojista kongreso okazonta 30. junio ĝis 2. julio en Bellinzona, estos pli frekventa ol en ĉiuj antaŭaj kongresoj. Fine de majo jam pli ol 70 delegitoj el ĉiuj landoj de Eŭropo, Brita kaj Nederlanda Hindio estis anoncintaj sin. Ankaŭ estos reprezentataj organizaĵoj de Usono, dum el Palestino, Sudameriko, Japanio, Sudafriko ktp. respondoj ankoraŭ estas atendataj.

La sekretariejo de ITF sendis al la organizaĵoj pri serio da gravaj demandoj raportojn (okhora labortago; koalicia rajto; elektrifiko; teknikaj plibonigoj ktp).

Precipe oni ankaŭ parolos pri la persekuto de fervojistoj en diversaj landoj.

KORESPONDEJO

Al kelkiuj. Viajn artikolojn pri la "lingva demando" ĉiujn ni publikigos en S-ulo sinsekve, ĉar ĉiuj enhavas interesajn por la legantoj argumentojn. Kompreneble nur iompost-iom ni povos represi la tutan ricevitan materialon. La spontana multflanka verkado pri la lingva temo montras, ke ĝi okupas multajn kapojn. La opinioj ĝenerale subtenas la redakcian vidpunkton kaj kontraŭas la "proteston" presitan en n-o 34.

1334. La proponojn mi enmetos baldaŭ.
4102. Via traduko uzota okaze.
4091. Via artikolo estas uzota.
4154. Viaj artikoloj bonvenaj. La versaĵo por SR. *Red*

V. Kongreso de SAT

Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

IV. komuniko

LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

Vieno estas la urbo, kie okazis pasintjare la XVI. kongreso de la burĝa Esperantistaro. Estas necese, montri al tiuj, kiuj en 1924 vidis la grandan ampleksecon de la burĝa kongreso, ke la proletaria Esperanto-movado ne estas malpli forta ol la tiel nomata "neŭtrala", ke ĝia potenco estas reala socia faktoro kaj ke sole la proletariaj Esperantistoj kapablas esti veraj internaciuloj.

Vieno estas urbo kun forta laborista movado kaj kun fortikaj laboristaj organizaĵoj. Al ili ni devas montri la uzeblecon kaj la vivantecon de Esperanto kaj ĝian praktikan valoron por la proletaria movado.

Tial nia V. kongreso devas esti potenca manifestado de la forto de SAT. Ĝi devas esti pasia alvoko al ĉiuj laboruloj ankoraŭ troviĝantaj sub la peza premo de burĝa idearo, por ke ili rekonu siajn klasajn interesojn kaj sian klasan devon.

Ĉiuj proletarioj, membroj de SAT kaj nemembroj simpatiantaj, nepre partoprenu la kongreson kaj aliĝu. La malalta kongreskotizo al ĉiuj donas la eblon aliĝi.

Kongresadreso: Josef Slezak, Wien 20, Ospelgasse 34/25.

Kongrestagoj: 11.—15. Aŭgusto.

Kongresejo: Laborista hejmo XVI.

Kongreskotizo: La simpla membrokotizo de SAT por la diversaj landoj. Senlaboruloj, post atestita senlaboreco, pagas la duonon.

Pago: per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj.

Aliĝo: Validaj estas nur aliĝiloj akompanataj de la kotizo. Laŭ decido de la prepara komitato, en interkonsento kun C. K. povas aliĝi al la kongreso ĉiu laboristo-esperantisto (ne-SAT-ano). Ĉi aliĝontoj ricevos specialan kongreskarton. La aliĝkotizo estas la sama, kiel por la SAT-anoj.

Loĝigo. Por prizorgi la konvenajn loĝejojn estas necese, ke la gek-doj mendu plej eble frue la bezonotajn ĉambrojn, ĉu privatan, ĉu hotelan ktp.

Gek-doj! Ne prokrastu la sendon de via aliĝo. Se vi mem ne povos veni, tamen subtenu nin per via kotizo.

Kongreskomitato de la V. Kongreso de SAT.

3. listo de kongresaliĝintoj

Aŭstrio

53	K-do	Pauk, Hans, Wien	
54	„	Effler, Alois, Wien	2135
55	„	Gutt, Paul, Wien	1793
56	K-dino	Jandik, Marie, Wien	
57	K-do	Zöchling, J., Bregenz	1513
58	„	Schwaiger, Jos., Salzburg	177

Germanio

59	K-do	Suckfüll, Martin, Frankfurt/M.	1056
60	„	Messmer Ant., Frankfurt/M.	94
61	„	Lehmann Rejno, Dresden	602
62	„	Klopfleisch P., Düsseldorf	920
63	„	Metzger, Herm., Stuttgart	3114
64	K-dino	Etzel, Sofie, Stuttgart	5053
65	K-do	Merkel, M., Stuttgart	1911
66	„	Siegert, Br., Schweidnitz	1851
67	„	Kopriwa Br., Dresden	742
68	„	Mahns, Richard, Röntgental ĉe Berlin	1013

Sovet-Unio

69	K-do	Valentinov Mik., Moskvo	4307
70	„	Jakovlev, P., Moskvo	3379
71	K-dino	Jakovleva, A., Moskvo	3740
72	K-do	Demidjuk, Greg., Moskvo	1516
73	K-dino	Kazina, Olga, Ufa	3569
74	„	Muĥajlova Nadjeĵka, Ufa	5153
75	K-do	Zuj, Jak., Krasnojarsk	4112
76	„	Kosima, Nikolenko, Nezlokmaja	1123
77	„	Burlin, Viktor, Orenburg	5003
78	„	Aleksandro, P., Orenburg	5002
79	„	Konovalov H., Niĵni-Novgorod	641

Ĉekoslovakio

80	K-do	Schweinfurter, Jos., Holleischen	4102

Anglio

81	K-do	Lees, William, Nottingham	3917

Italio

82	K-do	Castagnino Rod., Siracusa	3698

Latvio

83	K-do	Krastin Ant., Riga	3684

Francio

84	K-dino	Feuiller V., St. Cierge	375
85	„	Tinlaud, S., Chambond	3792
86	„	Gerin, G., Chateauneuf	3920
87	„	Gerin, A. M., La Chaudière	3921

Donacoj por la kongreso

Lees 1.50 mk., Lehmann 0.50 mk., Klopfleisch 0,50 mk., Metzger 2 mk., Kosjina 25 kop., Kopriva 1 mk., Schweinfurter 3 ĉk., Mahns 0.50 mk., Deiters 1.50 mk., Mailand 0,50 mk., Murawkin 1 mk., ALLE, grupo Innsbruck 2 S.

Propono N-o V

Pro bedaŭrinda manko de unueco en la instru-metodo, la Kongreso elektu "pedagogian Komisionon", kaj decidu aperigi en Sennaciulo konstantan fakon de "Instruado". Ĉiu N-o devas doni iom post iom la plenan gramatikon de la lingvo, bonstilan kaj interesan tekston por legado, evitante malfacilan fraz- kaj vortkonstruon, kaj nur poiome prezentante pli kaj pli komplikitan kaj seriozan materialon. La Pedag. Kom. liveru atestojn al ĉiuj aktivaj esperantistoj, pruvintaj en praktiko sian kapablecon de instruado kaj sian perfektan posedon de la lingvo, tiel ke ili povu instruadi kaj gvidi oficiale kursojn.

(La SAT-anoj de Orenburg).

Propono N-o VI

Ĉar gvidado de SAT flanke de Direkta Komitato estas tre malfacile efektivigebla pro la grandaj distancoj inter apartaj D. K.-anoj kaj ĉiaokaze, pro la samaj kaŭzoj, maleblas rapidaj decidoj de D. K. rilate aktualajn problemojn, la statuto de SAT estu ŝanĝita surbaze de jenaj principoj:

1. Inter du Kongresoj la ĝenerala gvidado de SAT estas komisiata al Ekzekutiva Komi-

LA INTERLIGILO DE L'P. T. T.

54 rue Custine, PARIS XVIII^e

estas nuntempe en la tutmondo

la sola

internacia, monata, teknika fakrevuo por poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj

Ĝi publikigis jam pli ol 400 fakartikolojn

Abonu!

Kostas nur 10 francajn frankojn jare!

tato, kiu laboras sub kontrolo kaj konsilate de Sennacieca Konsilantaro (antaŭa Direkta Komitato).

2. Sennacieca Konsilantaro konsistas principe el tiom da membroj, kiom estas da geografisektoroj en SAT.... (sekvas la nuna teksto de artikolo 11 de l' statuto).

3. Sennacieca Konsilantaro elektas ekster si Ekzekutivan Komitaton, kiu konsistas el 9 anoj, nome: 1 ĝen. Sekretario, 1 helpanto, po 1 respondeca ano de ĉiu fako (Redakcio, Administracio, Eldonkooperativo) kaj 4 aliaj membroj elektotaj en la sideja urbo de la Asocio.

4. Ekzekutiva Komitato partoprenas en la balotoj, okazantaj inter la S. K.-anoj, per tri voĉoj kolektivaj, t. e. ke la naŭmembra kolektivo rajtas nur tri voĉojn.

5. En okazo de konflikto inter la Ekzekutiva Komitato kaj Sennacieca Konsilantaro, la Kongreso prijuĝas la aferon kaj decidas, ĉu ĝi devas esti finfine decidota per la tuta anaro.

6. La E. K. interkonsente kun S. K. ellaboras "internan" regularon, nepre obeendan.

7. La E. K. rajtas en ĉiu urbo elekti peranton aŭ reprezentanton de SAT kun limigita mandato. Al tiuj funkciuloj la E. K. komisias en la urbo organizon de SAT-laboro surbaze de la decidoj de IIIa SAT-Kongreso (punkto III de gvidrezolucio). *1516.*

RECENZEJO

Gazetoj

Represis el S-ulo: *A Világ,* Targu Mureŝ, 30. 5., Unua fabrik-kuirejo (S. 30), *The International,* Johannesburg (S.-A.), 15. 5., Sklaveco kaj civiliz. (S. 21), *Le Journal du Peuple,* Paris, 30. 5., Dana lokaŭto (S. 22), El Ĉekoslov. (S. 29), Parlam. batalo (S. 18).

Enpresis div. artikolojn: *The Worker,* London, 30. 5., tuta kolono pri kaj parte en Esp., *The Plebs,* London, junio, recenzas "Ni Legu" kaj presigas varb-artikolon pri "praktika internaciismo".

Represo el S. Revuo: La artikolo scienca el febr. kajero 1925 de k-do N. A. Iljin pri *seksaj signoj ĉe kokoj* estas aperinta itallingve (en trad. de nia k-do Carbone) kiel aparta broŝureto.

Libroj

La situation materielle et morale de l' instituteur dans le monde de *M. Boubou.* (La materia kaj morala situacio de la instruisto en la mondo). Eldonis: *Internacio de la instrulaboristoj.* Sidejo: 33, rue de la Grange-aux-Belles, *Paris* (Xe). Formato: 16×24 cm. 96 pĝ. Prezo: 2 fr. fr.

Se ekzistas ankoraŭ skeptikuloj — kaj bedaŭrinde jes ekzistas — pri la tuja aplikebleco de nia lingvo, mi kredas ke sufiĉus meti en iliajn manojn tiun verkon de nia k.do M. Boubou por ke ili estu kuracataj. Ili povus vide, palpe konstati la rezultaĵon de enketo farita nur per la helpo de esp-o. Tiu fakto estas konfesita de la ĝenerala Sekretario de la eldoninta organizaĵo en noto aldonita.

Esp-o estis ja la sola uzata lingvo, sed necesas aldiri, ke la nura ekzisto de multaj esp-aj instruistoj en la mondo ne sufiĉus tamen por ke nia k-do povu sukcese plenumi sian taskon. Necesis plie la SAT-aparato kiu ebligis al li trovi ties adresojn.

Decas insiste konigi tiun fakton, kiam oni konstatas, ke nun multaj esp-istoj ne ankoraŭ komprenis la praktikecan karakteron kaj la gravecon de nia SAT-movado. K-do Boubou montris al ni kiel oni povas trafe uzi la SAT-aparaton; li donis plej bonan kaj imitindan ekzemplon al la SAT-anoj. Anstataŭ diskutaĉi, politikaĉi kaj proponaĉi neefektivigeblaĵojn, multaj k-doj pli utilus nian movadon se ili entreprenus similan enketon pri sia propra korporacio aŭ pri esploro de ia ajn afero interesa por la laboristaro. Sed ja estas pli facile proponadi, kritikadi ol praktike kaj utile labori, tial mi esperas, ke la bona ekzemplo de nia k-do trovos multajn imitontojn.

Kvankam la jena verko estas eldonita franclingve kaj tute ne celas propagandi esp-on, mi tamen opinias, ke ĝi estas plej taŭga propagandilo por nia lingvo. Sekve mi varme konsilas al ĉiuj havigi al si unu ekz-on de tiu valora varbilo. *E. L.*

Psalmo de ministo

La minposedanto estas mia Sinjoro; mi nur konas mizeron.

Li kondukas min malsupren en la profundan ŝakton, li kondukas min al la tenejo de l' multvaloraj metaloj.

Ne memoras li pri mia animo; sur la vojoj de l' danĝeroj li kondukas min, pro sia profito.

Kaj kiam mi postulas pli altan pagon por mia laboro, mi nur rikoltas malbonon ĉar ĉiam li estas proksima de mi kaj liaj pafiltenantoj kaj lia milicio insidas min.

Antaŭ la vizaĝo de miaj malamikoj li preparas al mi la milittribunalon, li batas min per bastonegoj, sur la stratoj fluas mia sango.

Vere, mizero kaj malriĉeco persekutos min dum ĉiuj tagoj de mia vivo, se mi ankaŭ plue permesas, ke la minoj restu privatposedaĵo. *R. K. Janes.*

Kiam vi ŝtelas palacon, bone al vi, kaj ve, kiam vi ŝtelas brikon.

La kulpo de la riĉulo ŝajnas kiel akaro, de la malriĉulo kiel elefanto.

Vi posedu la plej altan animon, la riĉulo ĉiam desupre rigardos vin. *M. Rozenfeld.*

DUM TIUJ ĈI TAGOJ

NI KOMENCAS EKSPEDI LA

JARLIBRON!

ABC de profmovado[1])

de *Ĉekin-Jarockij*

I. Tipoj de profunuiĝoj

1. Fundamentaj tipoj de profunuiĝoj

En distanco de la tuta historio de profmovado (kaj ĝi enkalkulas pli ol 200 jarojn, ĉar la unuaj profunuiĝoj aperas en Anglio komence de XVIII, se ne fine de XVII jarc.) la proforganizado *montriĝis en kvar bazaj tipoj.* Memkompreneble, ke la diversecon de variaĵoj de la profmovada organiza konstruado ne eblas lokigi en kiajn ajn firmajn kadrojn. Eĉ en Sovetio, kie komence de la Oktobra revolucio la unueco en organiza konstruado estas gardata pli, ol en ĉia alia lando, ni trovas en konstruo de ĉies unuiĝo originalecon, kiela mankas en ĉiuj aliaj. La konstruo, ekz., de l' fervojistunuiĝo, aŭ tiu de l' akvistoj, per nenio memorigas al ni la konstruon de l' unuiĝo de komunmastrumadlaboristoj aŭ de l' artlaboristoj, krome ke ĉiu unuiĝo kunligas la laboristojn de unueca produktado. Eĉ laŭ sia konsisto la unuiĝoj ne estas unutipaj. Per kio distingiĝas ĉiuj anoj de l' fervojistunuiĝo? Per tio, kompreneble, ke ili ĉiuj partoprenas tiel-aliel la subtenadon de l' fervojmastrumado, t. e. teknikan plenumadon de unueca produktproblemo. Per kio distingiĝas la anoj de komunmastrumadunuiĝo? Per tio, ke ili priservas vicon de bezonoj de l' loĝantaro, de bezonoj, ligitaj per unuecò de administrado: estas tie-ĉi fajrestingistoj, ankaŭ razistoj, ankaŭ tombistoj ktp. ktp. La produkteca diferenco inter la maŝinisto kaj relŝanĝisto aŭ ŝarĝakceptisto entute ne estas pli granda, ol diferenco bazita je labordivido en unu, teknike unueca produktaĵo. Kaj la produkteca diferenco inter razisto kaj fajrestingisto konsistas en tio, ke oni nenian teknikproduktan ligon povas inter ili konstati. Ilia simileco, bazita je administrativa unueco konsistas nur en tio, ke razisto, samkiel fajrestingisto priservas la bezonojn de l' loĝantaro, kies priservado estas administrata de unu sama fako de l' sovetmastrumo, nome de komunfakoj.

Tamen malgraŭ tia originaleco de ĉiu unuiĝo en Sovetio, ni plenrajtas paroli pri tipo kaj nome pri unueca tipo de la rusaj unuiĝoj. Same malgraŭ la varieco de l' organizaj movadformoj ni povas paroli pri *kelkaj fundamentaj tipoj* de l' profunuiĝaro sur la tuta terglobo.

Tiuj fundamentaj tipoj estas:

tred-junionoj[1]) — aŭ tipoj de korporaciunuiĝoj;

sindikato — aŭ organiza tipo de batalanta ekonomismo kaj, fine,

"*Geverkŝaft*[2])" — aŭ tipo de profproduktunuiĝo,

industriunuiĝo — aŭ tipo de laboristorganizado laŭ produktado.

2. Tred-Junionoj.

Kion prezentas la unua el ĉi tipoj?

"Tred-junion" angle signifas "profunuiĝo". Sed ĉar la formiĝintaj en Anglio je la 50-aj jaroj profunuiĝoj akiris firme fiksitajn trajtojn, diferencigantajn ilin de l' pli malfruaj unuiĝoj en Germanio, Francio k. a. landoj, — tial per la angla esprimo oni kutimiĝis signi apartan tipon, formiĝintan unue en la klasika patrolando de kapitalismo.

"Modela" tredjuniono oni ĉiam eĉ mem en Anglio konsideris la maŝinkonstruistunuiĝon, tiel nomatan "Amalgaman Societon de Mekanikistoj". Formiĝinta el vico de malgrandaj, lokaj kaj tutanglaj unuiĝoj, kies anaro estas ne pli ol 70 000-opa, iniciate de tri eminentaj profmovadlaboruloj tiutempaj — Alban, Njuton kaj Getĉinson, — la Amalg. Soc. de Mekanikistoj efektive iĝis modelo, laŭ kiu egaliĝas ĉiuj aliaj anglaj profunuiĝoj. (Daŭrigota)

Elrusigis *S. Rozenojer.*

1) profesi-unuiĝa movado. Red.

1) *Trade Unions* — originlingve (angle).

2) *Gewerkschaft* — originlingve (germane).

SUPLEMENTA PAGO AL
"SENNACIULO"
N.o 39 — 25. JUNIO 1925

LA LERNANTO

PETRO FRATECE SALUTAS
ĈIUJN LERNANTOJN STUDEMAJN.
BALDAŬ LI PREZENTOS SIN.

Unu homo mortis....

de Martin Andersen Nexö

Eltiraĵo el la romano "Stine Homidino"

Oni diras, ke unu kaj duona miliardoj da steloj en la vastega ĉiela spaco ekzistas kaj, kiel oni scias, ankaŭ unu kaj duona miliardoj da homoj sur la tero. — Steloj kaj homoj — *egalnombraj* ili estas. — Oni preskaŭ povus kredi, ke la prauloj pravis, opiniintaj, ke ĉiu homo naskiĝas sub sia propra stelo. — Ĉie en centoj da valoraj observatorioj, konstruiĝintaj jen sur ebenaĵoj, jen sur altaj montoj, sidas talentitaj saĝuloj, armitaj per la plej delikataj instrumentoj, esplorantaj tage kaj nokte la ĉielspacon. — Ili observadas kaj fotografadas, dum la tuta vivo sin okupantaj *nur* per *unu ideo:* Nemortebliĝi per la malkovro de nova stelo aŭ per la konstato de malapero de iu ĉielkorpeto; *unu* stelo *pli* aŭ *malpli* — de la unu kaj duona miliardoj, ĉirkaŭvagantaj ekstere. —

Ĉiusekunde mortas iu homo. — *Lumo* estingiĝis, por neniam ree esti eklumiĝonta. — Stelo, kiu eble eksterordinare bele brilis, kiu ĉiuokaze posedis propran, neniam ankoraŭ vidiĝintan spektron. — *Estulo,* disvastiginte ĉirkaŭ si, *eble* bonecon, *eble* genion, forlasis la teron: *Tia,* nur *unufoje* viditaĵo, la en karno kaj sango enkorpiĝinta *miraklo* — *ĉesis ekzisti.* — Neniu estas ripetiĝo de alia persono aŭ estos mem ripetata iam. — Ĉiu homido similas al kometo, nur *unufoje* dum la eterneco palpanta la tervojon kaj migranta nur mallonge sur ĝia lumanta vojo..... fosforiĝo inter du eternecoj....

Tiam funebras la homoj pro ĉiu, la teron forlasanta animo — —; ĉirkaŭ ĉiu ĉerko ili staras kaj diras seriozege: "Vidu do, kiom perdis la mondo, neniam revenonta! Vidu kia mirindaĵo ĉi fojon feliĉigis la teron!"

La heroino "*Stine*" *ne* estis estingiĝinta stelo, por ke oni estu devinta enregistri ŝin por ĉiuj tempoj. — Penege ŝi ekbatalis la lokon porekzistadan. — Kiel unu el la multnombra griza amaso de unu kaj duona miliardoj, ŝi komencis laboron kaj utiligis sin. — *Stine* riĉigis la teron, sed sen ricevi dankon por tio, ĉar ŝi nur estis unu el la sennomuloj. — Homidino, kies signo estas la ĉiamaj malglataj manoj....

En la pormalriĉula angulo de l' tombejo oni enterigis ŝin — tie, kie la tomboj estas detruotaj, kiel eble plej rapide, por fari lokon al novaj; nature oni entombigis ŝin je publikaj elspezoj, kaj *tio* nur estis la *sola honormontriĝo* dum la tuta vivado kaj ĉi tio ne estis libervola...! "Ĉu tio kapablis moligi korojn? Ĉu....?"

Esperantigis: *E. Berger.*

La akrido

Ĉu ĝi estas la ĝendarmo de la insektoj?

Dum la tuta tago, ĝi saltas, obstinege persekutas nevideblajn ŝtelĉasistojn kiujn ĝi neniam ekkaptas.

La plej altaj herboj ne haltigas ĝin.

Nenio timigas ĝin, ĉar ĝi havas sepmejlajn botojn, bovoviran kolon, genian frunton, ŝipkorpan ventron, celuloidajn flugilojn, diablajn kornojn kaj longan glavon sur la postaĵo.

Ĉar oni ne povas posedi la virtojn de ĝendarmo sen liaj malvirtoj, estas necese diri ke la akrido maĉas tabakon.

Se vi opinias ke mi mensogas, sekvu ĝin per viaj fingroj, kaŝludu kun ĝi, kaj kiam vi ĝin estos kaptinta inter du saltoj sur folio de medikago (? Red.), observu ĝian buŝon: el siaj teruraj makzeletoj ĝi sekrecias ŝaŭmon nigran kiel tabaka suko.

Sed jam vi ne plu tenas ĝin. Ĝia pasiego por salti reprenas ĝin. La verda monstro forsaltas el vi per subita streĉo kaj, facilrompebla, dismetebla, lasas en via mano mallongan kruron.

* * *

La lumanta vermo. Kio okazas? Naŭa de l' vespero, kaj estas ankoraŭ lumo en ĝia hejmo.

*

Ero de luno en herbo!

Jules Renard.

El la franca lingvo tradukis G. Hugot-Raison.

La tagiĝ-signalo

Iam vivis tre riĉa bienposedanto kaj granda kapitalisto. Li pasie ŝatis kortbirdaron ĝenerale kaj kokojn speciale. Nur unu afero kaŭzadis ĉe li furiozecon, nome: kokkrio. Li ordonis al siaj servistoj enfermi kortbirdaron en malluma kokejo, por ke matene ilia krio ne veku lin. Sed vane! Ĉiumatene lian dolĉan dormon interrompis laŭta kanto de kokoj, kiuj eksentis la tagiĝon, malgraŭ ĉiama mallumo reganta la kokejon. Laŭ ordono de bienulo ĉiumatene iu el servistoj dehakis kapon de iu koko, por timigi tiamaniere aliajn. Sed ĉi-antaŭzorga rimedo neniom helpis. La kokoj ne ĉesis kanti, kaj servisto ĉiumatene dehakis la kapojn de malfeliĉaj kokoj. Fine la kokoj ne povis toleri tian konduton flanke de sia Sinjoro kaj sendis sian reprezentanton por intertrakti kun li.

— Malbenitaj kreitaĉoj! Kial vi alvokas tagon? Lasu al nokto daŭri eterne!

— Ni ne alvokas tagon, respondis tiam la reprezentanto. Tago mem venas —, kaj tial ni ĝin alvokas.

Kaj se vi dehakus kapojn eĉ ĉe ni ĉiuj, tamen tago venos.

Libere trad. *Hn.*

La laboristo

(El: „La ŝtalfabriko" de *Max Dortu.*)

"Bonan tagon, sinjoro."
„Bonan tagon."
„Mi aŭdis, ke vi serĉas laboristojn?"
„Kiel jaraĝa vi estas?"
„Kvardekdujara."
„Kvardekdu? Tiam revenu post dek jaroj, kiam vi estos tridekdu!"

*

Li foriris. Larmojn en la okuloj. Koleron en la animo. Kaj li serĉis. Li serĉis la tutan tagon. Kion li serĉis? Li serĉis mangrenadon kaj ŝnuron. La grenadon li ne trovis. Sed li trovis la ŝnuron.

Kaj li iris kaj pendigis sin. Sur lanterno. Dumnokte. Rekte antaŭ la urbestrejo.

Kiam oni sciigis al la urbestro, matene dum la kaftrinko: "Iu ajn pendigis sin, rekte antaŭ la urbestrejo —" diris la "sinjoro urbestro":

"Tio estas skandalo!"

*

Kiam la mortinto estis enterigata, la ĉerko estis tre malpeza, ĉar la mortinto nur pezis 40 kilogramojn. *Trad. Mefisto.*

La Testamento de Joe Hill[1)]

Pri testamento mia estas facile decidi,
Ĉar nenio restas por dividi,
Parencoj miaj ne ekscitiĝas —
„Ŝtono ne akiras muskon kiam ĝi ruliĝas."
Kadavro mia? Ha se elekti mi povus,
Cindrigita ĝi sin trovus,
Gajaj ventoj disĵetantaj
Polvon mian al floroj kreskantaj.
Hazarde, iu floro velkanta
Renaskiĝante estos floranta.
Jen mia lasta volo pri ĉi-argil',
Feliĉon al ĉiuj el vi, Joe Hill.

Elangligis *Georgo Saville.*

1) Joe Hill estis fama I. W. W.-laboranto, kiu estis trompakuzita pro rabo kaj mortigo. Li estis kondamnita kaj verkis ĉi supran poemon en sia ĉelo ĵus antaŭ sia ekzekuto, kiu okazis 18. de novembro 1915.

Kio helpos nin sur tero
Por la granda nia cel'?
Ĉu la diabloj de l' infero
Aŭ la dioj de l' ĉiel'?

Ne, amikoj! Nek la dioj,
Nek la diabloj de l' infer',
Nur ni mem per propraj scioj
Venkos ĉion sur la ter'!

Originale verkis P. Aleksandrov.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG